# ESPERANTO EN AFRIKO

Oficiala bulteno de la Afrika Komisiono de UEA

15-a jaro, n-ro 45(2021:4)

*Karaj legantoj,*

*La jaron 2021 markis diversaj etaj sukcesoj: produktiĝo de filmoj, muzikalbumoj, malfermiĝo de ret- kaj ĉeestaj kursoj, regula aperigo de la bulteno, okazigo de relative granda nombro da retkunvenoj naciaj kaj internaciaj, renovigo kaj ekfunkciigo de la reta reprezentejo de la kontinenta movado, rearanĝiĝo de la Afrika Komisiono kun nova kunordiganto kaj lastatempe renaskiĝo de la junulara organizo en Madagaskaro k.t.p.*
*Okazis ankaŭ io, kion de jaroj ni ne spertis: multe da interŝanĝoj kaj pozitivaj kontaktoj pri afrikaj kulturaj fonoj. Tiuj ĉi estas la merito de Afrika Reto de Kolektiva Agado por la Lingvaj kaj Kulturaj Identecoj (ARKALKI), kies unuaj konkretaj agadrezultoj estas i.a. la realigo de rakontoj kun traduko kaj voĉlegaĵoj en pluraj afrikaj lingvoj.*
*Tiom da atingoj pri kiuj ni certe ĝojas kaj fieras. Tamen, necesas, ke ni pensu ankaŭ pri la estonteco. Ja proksimiĝas la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE) 2022 en Senegalo, kaj ne tro longe post tio, en jaro kaj lando ankoraŭ nedeciditaj, la unua Universala Kongreso (UK) de Esperanto en la kontinento.*
*Ni plu organiziĝu, malgraŭ la malfacilaĵoj, ĉiu laŭ siaj kapablo kaj eblo, por teni pli alten la verdan torĉon, en la kontinento. Ni diskonigu la venontjarajn renkontiĝojn, parolu pri ili ĉirkaŭ ni, kaj pli ol ĉio alportu niajn ŝtonojn. La kuraĝo kaj laboro estas la vojo antaŭen!*
*Bonan legadon kaj pasigu agrablajn jarfinajn momentojn!*

***La redakcio***

*****************

## Zamenhofa festotago en Antananarivo

Itaosy Esperanto-klubo (IEK) sukcese okazigis la festan renkontiĝon je la 10-a horo en Gastro-Pizza en Andohatapenaka sabate la 4-an de decembro 2021.

Ĝin ĉeestis 9 geesperantistoj. Amikino kaj elstara esperantistino Lala rekte telefonis al ni por saluti kaj kuraĝigi nin. Tre amikeca kaj mojosa estis la etoso. Ni kantis la Esperanto-himnon, konkure ludis en Esperanto kaj manĝis bongustajn picojn kaj sandviĉojn.

Post tio, la gejunuloj aparte diskutis pri la asocia vivo, kaj ili decidis revivigi Malagasan Esperanto-Junularan Asocion (MEJA). (Informo pri tio legeblas ĉe p.8). Ni ĉiuj rendevuis por la novjara renkontiĝo en 2022.

**Henriel Fidilalao Firaisana**



# Nova estraro en DR Kongo

La multjara aktivulo Jean Bosco Malanda iĝis la prezidanto de la nova estraro de Demokrata Kongolanda Esperanto-Asocio (DKEA) ekde la 4-a de oktobro 2021. La aliaj estraranoj kaj iliaj postenoj estas Alphonse Waseka (1-a vicprezidanto), Guy-Roger Ileke (2-a vicprezidanto), Alexandrine Omba (ĝenerala sekretario), Monique Badiengisa (kasistino), Honoré Mafuila (kultura konsilanto) kaj Arlain Kizeyidioko (administra kaj financa konsilanto).

La ceremonio de transpreno de taskoj inter la elirantaj kaj novaj estraranoj okazis la 1-an de novembro. Kaj tuj poste la nova estraro, kies ofici-periodo estas tri-jara, kreis strategion, kiu konsistas el konatiĝo kun ĉiuj enlandaj E-kluboj kaj unuopaj esperantistoj. La celo estas revigligi la rilaton kun ĉiuj kaj per tio pli alproksimigi ilin al la agadoj de DKEA. Alphonse Waseka dissendis alvokon al reprezentantoj de ĉiuj lokaj kluboj, fakaj grupoj pri konigo kaj registrigo.




DKEA estas aliĝinta asocio de UEA de 1966, kaj ĝi en la kuranta jaro havas 95 individuajn membrojn. La nova valida asocia retpoŝtadreso estas: *dkea.kongasocio@gmail.com.*

**Florent N'toto**

# Kerno de nova junulara agado en Madagaskaro

Dum la Zamenhofa festotago okazigita de Itaosy E-Klubo en *GastroPizza* Andohatapenaka sabate, la 4-an de decembro 2021, kun la partopreno de 9 gee-istoj, je la 12-a horo kaj 58 minutoj, la gejunuloj aranĝis apartan kunvenon por diskuti pri diversaj aferoj rilate al Esperanto en Madagaskaro.



Estis decidite ke ni, gejunuloj, provizore revivigos la dormantan organizon Malagasa Esperanto-Junulara Asocio (MEJA), kaj ni elektis inter ni la estraranojn: Manohimiharintsara Andrianirina *miharyandrianirina@gmail.com* (prezidantino), Tatiana Ravololomampionona *ravoanah26@gmail.com* (sekretariino), Ranja Robertine Jeanne d'Arc Zafinifotsy *ranjaarc@gmail.com* (kasistino), Fanomezantsoa Midera N. A. Fifaliana *mideralauxdi@gmail.com*, Fanomezantsoa Mialy Ny Aina *fmialynyaina@gmail.com* kaj Felaniaina Rovasoa Erica *rovasoaeric@gmail.com* (konsilantoj).

Ni tuj laboros kaj konstatos la evoluon kaj progreson de nia asocio antaŭ ol definitive oficialigi ĝin. Ni invitas ĉiujn junajn geesperantistojn en la lando aliĝi al MEJA. Niaj unuaj taskoj estas la preparado de la novjara renkontiĝo kaj la partopreno al la okazigota lingvoekzameno en 2022.

**Tatiana R.**

# Kampanjo Hans Bakker en Senegalo

Ekde la 16-a de junio 2021 ĉirkaŭ kvardeko da personoj en Senegalo pli-malpli regule ricevas Esperanto-instruadon sub la gvido de Lafi Charles Diatta per whatsapp-grupo, kadre de la kampanjo Hans Bakker kaj "Vigla E-jaro 2022 en Senegalo".

Laŭ Lafi Charles Diatta: *La celo estas helpi al la progresantoj perfektigi sian lingvo-scion, kuraĝigi komencantojn progresi en la lingva lernado, emigi hezitemulojn esperantistiĝi kaj fine pliigi la nombron de enlandaj Esperanto-uzantoj*".

Senegalaj esperantistoj ne limigas sian iniciaton al nura distanca lernado per poŝtelefono, ili intencas ankaŭ malfermi okazajn ĉeestajn semajnofinajn kursojn, kaj ili alvokas: *Abundas tra Esperantujo vojaĝemaj instruemuloj, trejnistoj kaj ni volonte bonvenigas kunlaborproponon de tiuj personoj, instancoj zorgantaj pri instruado pri aranĝo de ĉeestaj kursoj en nia lando.*

Senegalo havas kunorganizan kursosperton jam kun kelkaj movadanoj, el kiuj citindas Mireille Grosjean kaj Privas Tchikpe. Tiuj ĉi en decembro 2012 vizitis la landon kaj gvidis surloke plensemajnan instruadon, kiu finiĝis per sukcesa ekzameniĝo de la kursopartoprenintoj.

**La redakcio**

# Nova E-filmeto en Burundo...

Ĉi tiun lastan tempon raportoj pri Esperanto-aktivaĵoj en Afriko pli kaj pli priskribas agadojn en rilato kun infanoj, sed oni antaŭe apenaŭ povis vidi tiujn infanojn esprimi sin en la zamenhofa lingvo. Necesas atentigi vin, ke kiel anoncite en ĝiaj planoj, la Afrika Komisiono de UEA daŭre donas subtenon por kreo de Esperanto-filmoj. Gilbert Niyukuri, vickunordiganto de la komisiono, kiu daŭre ĝuas ankaŭ bonan laborrilaton kun siaj kolegoj, ĵus produktis ĉ. 4-minutan filmon en kiu oni vidas infanojn flue paroli Esperanton. Bv. mem spekti kaj ŝati la filmon per *https://www.youtube.com/watch?v=JYwodaBmInk*.

La Afrika Komisiono intencas pliigi filmagadojn, por kiuj, tamen, financa subteno de vi




kaj de viaj organizaĵoj estas bonvena al la konto *Afriko* ĉe UEA.

**Afrika Komisiono de UEA**

# ... kaj ankaŭ en DR Kongo

Bonvole spektu kaj ŝatu la filmeton: *https://youtu.be/VrdSexx9fmA*. Per ĝi Waseka Kamango Alphonse kaj liaj kolegoj de la organizo Solidareca Bonvolo (SBV) en DR Kongo prezentas pri siaj vendcelaj manfaritaj aĵoj. Per tio ili mongajnas ekster siaj Esperanto-aktivaĵoj. La afero estas ekzemplodona kaj kuraĝinda.

SBV estas bonfara organizo, kiun funkciigas esperantistoj en la konga urbo Goma.

Mi estas Alexandrine OMBA, la prezidantino de la virina asocio EVAA, mi loĝas en Kinŝaso en DR Kongo. Mi volas valorigi nian amikecan lingvon Esperanto per filmetaj iniciatoj. Mi jam faris kelkajn videojn, kiujn vi povas spekti ĉe Jutubo per la serĉvortoj *vilaĝo EGSR*. Mi vere serĉas subtenulon por daŭrigi miajn iniciatojn. Ĉar mankas al mi kamerao kaj kelkaj materialoj, mi antaŭdankas tiujn, kiuj subtenos.

# Afrika retejo renoviĝis kaj funkcias




La unuaj rezultoj montras la retejon pli facile uzebla kaj administrebla, sed la klopodoj fari ĝin ankoraŭ pli vigla, fleksebla, alloga, tekstenhave pli freŝa kaj lingve ĝusta pluokazas sub la rigardo de la UEA-Komisiono por afrika agado. Volontuloj por kontrollegi la tekstojn estas tre bonvenaj kaj ne malpli dankataj.

La nova retejo konservis kelkajn el la antaŭaj funkcioj, krom aldono de novaj. Ekzemple, ĝi nun kapablas redirekti uzantojn al la sociaj retejoj kiel Fejsbuko, Telegramo, Instagramo, Tvitero k.s. Eblas fari esplorojn sur la reta reprezentejo de la kontinenta komisiono per la serĉilo, kontakti la mastrumantojn. Krome vizitantoj povas fari komentojn sub la afiŝitaj artikoloj. Mallonge, la nova retejo disponas multe pli da spaco, evitante forigon de malnovaj materialoj por meti novajn, kiel okazis regule kun la malnova retejo.

Unu el la ĉefaj celoj de la retejo *www.aesperanto-afriko.org* estas havigi kaj arkivi informojn pri la ĝenerala afrika Esperanto-movado. Tial eblas ekaboni ankaŭ senpage novaĵleterojn por regule ricevi perretpoŝte freŝdatajn novaĵojn pri la Esperanto-movoj kaj ĝeneralajn informojn pri la kontinento. Bonvole vizitu la retejon, voki nin aŭ lasi al ni mesaĝon pri ajnaj zorgoj. Ni volonte respondos al vi kiel eble plej rapide.

La renovigo de la retejo kaj transigo de informoj de la malnova retejo realiĝis danke al plursemajnaj teknikaj laboroj de loka reteja gastiganto kun la helpo de Adjévi Adjé, aktiva membro de la Afrika Komisiono, kaj financa subteno de ESF. Por plene profiti la etendeblecon de la retejo, ni iom post iom igos ĝin ampleksa kaj profesia informbanko por diversspecaj esploroj pri Esperanto en Afriko.

**Adjévi Adjé**

# E-Klubo Sunleviĝo dankesprimas

Mi instruas Esperanton al geinfanoj de 11-14 jaroj en Moramanga, Madagaskaro. Mi petis librojn en la afrika retlisto. Respondeculo aŭ volontulo de UEA sendis al mia lernejo librojn, kiuj bone alvenis ĉe mi en aŭgusto kurantjare, sed mi ne sciis kie afiŝi tiun mian dankon.

Ankaŭ mi ne memoras la nomon de la persono, kiu sendis la librojn, des pli ke nur la adreso de UEA estis sur la pakaĵo. Miaj gekursanoj ege kontentis, vidante la alvenintan poŝtaĵojn.

**Rafanomezantsoa Fafah**
*fafahrayan@gmail.com*

# La burundano Aimé-Patrick M. diplomiĝis E-instruisto

**Aimé-Patrick Manirakiza ricevis la diplomon de Esperanto-instruisto post dujara perreta lertigado en la programo Esperanto Instruista Trejnado (EIT), sub la gvidado de d-ro Katalin Kováts kaj post plensemajna ĉeesta staĝo sub la kontrolo de s-ino Mireille Grosjean. Li tiel iĝas unu el la raraj afrikaj esperantistoj ricevintaj internacian diplomon pri instruado de la lingvo Esperanto.**



De dekstre: Patrick Manirakiza kaj Gilbert Ndihokubwayo.

Finfine la verdikto estis dirita: la burundano Aimé-Patrick Manirakiza ricevis la diplomon «Esperanto-instruisto» sekve de diligenta lertiĝo pri metodiko kaj gramatiko per la 40-retleciona instruista trejnado Esperanto-Instruista Trejnado (EIT), ĉe kies fino li sukcese prezentis sian modellecionon post la 7-a tutkontinenta kongreso en Buĵumburo, Burundo, kun la ĉeesta gvido de Mireille Grosjean, la tiama prezidanto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).

La decido pri lia diplomiĝo venis nur nun ĉar estis periodo de atendo de la Manlibro pri Instruado de Esperanto sekvita de esploroj pri eblo transdoni la atestilojn kaj la librojn en Burundo.

Aimé-Patrick Manirakiza laŭprofesie estas komputilisto, kaj li laboras ĉe Higherlife Foundation, socia organizaĵo de la telekomunikada kompanio Econet Wireless en Burundo. Li eklernis Esperanton en la jaro 2004, dum li estis en la mezagrada lernejo en la urbo Nyanza-lac. Ekde 2018 li estas la prezidanto de Asocio Nacia de Esperantistoj en Burundo (ANEB), landa asocio aliĝinta al UEA.

En la aĝo de 34 jaroj, Aimé-Patrick estas la sepa infano de familio de 9 geknaboj (4 filoj kaj 5 filinoj), kun kiu li kreskis ĝis 2009 en la urbo Nyanza-Lac en la provinco Makamba je 125 km de Buĵumburo, kie li nun loĝas. Krom pasion al Esperanto, li havas emon ankaŭ al filmado kaj fotado, pri kiuj li instruis dum la 7-a AKE. Cetere li estas la filmisto kaj produktinto de la 26-minuta filmo pri la 7-a tutkontinenta kongreso en Burundo. Aimé-Patrick Manirakiza estas unu el la sep burundanoj partoprenintaj en la 73-a Interncia Junulara Kongreso de TEJO 2017 en Aneho, Togolando, dank' al la Afrik-Eŭropa Junulara Kapabligo (AEJK)-projekto.

ILEI lanĉis EIT, Esperanto-Instruistan Trejnadon, en 2017. Temas pri plenjara perreta lertigado kaj plensemajna ĉeesta staĝo. En Eŭropo sukcesis tri personoj. En Afriko sukcesis du personoj: Patrick Manirakiza kaj Gilbert Ndihokubwayo.

**Adjévi Adjé**



ilei

edukado.net

DIPLOMO

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj la porinstruista retejo edukado.net atestas, ke

Sinjoro Patrick MANIRAKIZA
(el Burundo)

sekvis 40-lecionan retan instruistan trejnadon, kadre de kiu li ricevis formadon pri metodiko kaj gramatiko, kaj dum la Afrika Kongreso en Bujumbura, sekvis kvartagan kurson kaj sukcese prezentis sian modellecionon.

La Chaux-de-Fonds, Svislando, januare 2020

D-ro Katalin Kováts, kursgvidanto

Mireille Grosjean, prezidanto de ILEI

# 2022 en Senegalo




Dek estraranoj kaj membroj de Senegala Esperanto-Asocio (SEA) kuniĝis en 5-hora kunveno fine de novembro 2021 en Rufisko ĉe la domo de la prezidanto Assane Faye. Tie ili diskutis ĝisnunajn agadojn, planojn, eblojn kaj perspektivojn de SEA kaj la 8-an tutkontinentan kongreson. Ĉe la unua punkto la gravaj atingoj de la komenco de SEA en 2004 ĝis la kuranta jaro retrospektive estis prezentitaj kronologie kaj analizitaj de ĉiuj, inspircele por postaj elpaŝoj. Okazis ankaŭ memormomento al ĉiuj forpasintoj kaj aparte al Alphonse Diatta, unu el la instigintoj kaj la unua prezidanto de SEA.

Alia grava diskutita punkto estis organizo de ĉeestaj kursoj dum la lasta trimestro de la sekva jaro. Ĉiu prezentis siajn opiniojn pri tio kaj pri tio kiel la koncernaj kursoj estos organizitaj. Unuanima deziro estas aranĝi la kursojn por komencantoj kaj progresantoj en Rufisko kaj Dakaro, respektive ĉe la Nacia Trejnado- kaj Agado-Centro (CENFA ) kaj Junulara Kristana Asocio (YMCA). Planoj pri korespondado kaj kontaktado kun enlandaj publikaj kaj enmovadaj instancoj estas starigitaj por pretigi la grundon instrucele.

En la fokuso de kursoj estas ankaŭ ideo pri aranĝo de senpaga reta kurso por senegalanoj, dum kiu oni proponu iun premion por la plej bonaj lernantoj. Sed por tio necesas kunlaboro de multaj personoj. Homoj, kiuj volonte instruos kaj okupiĝos pri la administra laboro (kreo de Google-formularo; elekto de la homoj; kreo de Facebook-paĝo; kreo de la anoncoj ktp.). La Afrika Komisiono de UEA kaj Mireille Grosjean enplektiĝas kaj nun esploras kune pri la plej bona far-maniero, sed tio certe ne sufiĉos.

Personoj kun sperto pri organizado de interretaj kursoj aŭ pri gvidado de perreta instruado povas helpi. Kaze, ke pro iu aŭ aliaj kialoj iu ne povas kunlabori, sed ĉiuokaze volas helpi, tiu povas donaci al la konto Afriko ĉe UEA kun mencio 'Senegalo 22'. Per la mondonacoj ni povas evoluigi la nunajn projektojn kaj realigi ilin sukcese.

La kunvenintoj fine memorigis pri tio, ke en la urbo Thiès okazos de la 26-a ĝis la 30-a de decembro 2022 la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE) kune kun AMO-seminario de UEA. Jen oportuna okazo por sproni la entuziasmon de la partoprenintoj de la Esperanto-kurso kaj per tio hejmigi ilin en la movado. Tiuj novbakitoj povos praktiki la lingvon, spertiĝi pri la movadaj ebloj dum la kongreso.

**Antoine Gomis**

**Vi povas per mondonaco al la konto *Afriko* ĉe UEA kontribui al la sukceso de la 8-a AKE. La donacoj estos uzitaj por: a) subvencii la partoprenon al la kongreso de afrikaj gejunuloj, kiuj aktivas por Esperanto, tamen ne havas la monrimedojn ĉeesti ĝin, b) pagi kompetentulojn por instrui pri konkretaj temoj, ekzemple, redaktado de vikimedio kaj c) subteni kapabligan agadon de Senegala Esperanto-Asocio.**
**Pliaj informoj ĉe:**
***ake-8-organizantoj@googlegroups.com.***

# Kvazaŭ korpo sen koro, nova afrika E-filmo

Estas frukto de 2-jara kunlaboro inter la Esperanto-Klubo Rondo Esperantista de Kiwanja (REK) kaj Kina Klubo *La Patience* de Rutshuru, Norda Kivuo, en DR Kongo, sub la kuninstigo kaj traduka laboro de Joel Muhire N. kaj Kambale Amani Love. La filmo aperis la 7-an de novembro 2021, kaj ĝi spekteblas en du partoj ĉe: *https://youtu.be/fOgcD8eFXIE* kaj *https://youtu.be/qv0WUYENO2s.*

La filmo prezentas ampleksan bildon pri konstante malfacila vivo en la orienta parto de DR Kongo, ekster la pli kruelaj pertranĉilaj murdaj scenoj en Beni far ADF NALU.

Espero, la ĉef-rolulino, havis normalan vivon kaj ardan revon iĝi la plej bona kaj lerta atletino de sia generacio. Sed iam pro konfliktoj naskiĝintaj en ŝia loĝoloko rezulte de politikaj voĉdonadoj, ŝi kaj aliaj samaĝulinoj bedaŭrinde perforte forkaptiĝis. Dum sia forkaptado, ili devis kontraŭvole servi en ribela grupo kun la nomo Movado de Sentima Generacio, kie ili ĉiuj plurfoje estis seksperfortitaj kaj truddevigitaj murdi. Finfine danke al la klopodoj de la familio kaj kunlaboro inter pluraj personoj kaj publikaj instancoj, Espero kaj ŝiaj amikinoj liberiĝis…

El la sentem-anima vidpunkto enhavaj scenoj estas malhumanj, sed bedaŭrinde ja temas pri aferoj vere okazintaj surloke en DR Kongo kaj en multegaj aliaj landoj sur la kontinento. Krom tiu ĉi terurada aspekto, la produktaĵo tamen estas kortuŝa, interesa kaj lingve kaj scenenhave. La paroloj de la aktoroj, kun subtekstoj en la franca, estas klare aŭdeblaj kaj tuj komprenataj. Tiu ĉi filmo ne nur rekomendindas por pli lertaj esperantistoj, sed ĝi taŭgas ankaŭ por komencantoj.





En Esperanto-Klubo Rondo Esperantista de Kiwanja (REK) kaj la Kina Klubo *La Patience* de Rutshuru formiĝas tuta reto de kunlaborantoj por fari filmojn kun ligo al edukado, kulturo kaj distro, cele informi pri la rajtoj de virinoj precipe en lokoj, kie estas militoj aŭ konfliktoj. *Kvazaŭ korpo sen koro* estas ilia unua filmo, kaj ili esperas progresi, liverante pliajn instruajn filmojn al la esperantistaro, kies komentojn kaj kunlaborojn ili volonte kaj dankeme bonvenigas por la poluro de siaj verkaj projektoj.

Ekde la komenco de *Kvazaŭ korpo sen koro* helpis per vasta informado kaj diskonigado Renato Corsetti, unu el la konsilantoj de la Afrika Komisiono de UEA, Germain Pirlot kaj Jean-Pierre Marcq. Same gravas mencii la kontribuon ankaŭ de s-anoj Ulrich Matthias kaj Kiah Morante, Miriadano, kies monsubtenoj, korektoj kaj konsiloj necesis por plene realigi la tutan projekton.

**Joel kaj Adjévi**




La Filmo: Kvazaŭ korpo sen koro: antaŭ la aktorado

# Afrika Komisiono kaj retkunvenoj

Kiam la ritmo ŝanĝiĝas, la danco ankaŭ ŝanĝiĝas. Antaŭ iom da tempo la retkunvenoj pli kaj pli iĝis parto de la kutimoj ĉe multaj afrikaj esperantistoj kaj aparte ĉe la membroj de la komisiono de UEA por la agado en Afriko, spite de diversaj malfacilaĵoj en la kontinento. Regule tiuj komisionanoj retkunvenas kun laŭvice invititaj gastoj, por fokuse priparoli landan agadon kaj enkontinentan movadon, ĝenerale.

Konkrete, la menuon de ĉi tiu retkunveno de la Afrika Komisiono konsistigas interkonatiĝi kun la partoprenantaj funkciuloj de la invitita lando, levi al ili demandojn pri enlanda agado, aŭskulti, laŭbezone orienti, informi ilin pri diversaj aspektoj de la Esperanto-movada strukturo. Aliĝinta landa asocio, kiu ankoraŭ ne havas komitatanon A, nek observanton en la komitato de UEA, ricevas informojn pri farendaj paŝoj por havi reprezentiĝon en la supera organo de UEA, ekzemple. Anoj de lando, kiu estas matura sed ankoraŭ ne aliĝis al UEA, ricevas dumkunvene sciigojn pri la kondiĉoj de aliĝo al UEA.

La 23-an de septembro 2021 okazis aparte interesa retkunveno de la Afrika Komisiono. En ĝi partoprenis la estrarano de UEA pri Afriko, Jérémie Sabiyumva, membroj de la Afrika Komisiono, estraranoj kaj membroj de la tanzania landa asocio (EATA), ĝiaj sekcioj de TEJO (JETO) kaj ILEI (IST) kaj s-ino Michela Lipari, membro de la komisiono de UEA pri Statutoj de landaj kaj fakaj asocioj. La interdiskutoj koncernis esence mankojn el la aliĝpeto de EATA al UEA, organizado de Tanzanio por oficiale kandidatiĝi por la UK en 2024 kaj aliaj praktikaj informoj pri glata kunlaboro inter la tanzanianoj mem por disvastigi Esperanton en sia lando kaj inter ili kaj la kontinenta komisiono, kies reprezentantoj, kiel ĉiam, memorigis pri la neceso por ĉiu landa asocio kunordiĝi landskale kun TEJO, ILEI kaj tiel plu.

Iniciatita de la Afrika Komisiono kun subteno de la estrarano de UEA pri Afriko, la afrikan retkunvenon gastigas la zoom-platformo de Irana Esperanto-Asocio (IrEA). La kunveno disvolviĝas ĉiun ĵaŭdon dum c. 2 horoj kun la celo kuraĝigi unu la alian, vive informiĝi pri movoj kaj pri problemoj, kiujn alfrontas invitita lando, por eventuale helpi al trovo de solvo. Por esplori specifajn problemojn la komisiono invitas al sia kunveno eksterajn kompetentulojn por veni priinformi la kunvenantojn.

Ĉu vi scias, ke eblas aliĝi al UEA kaj pagi nur 2 EUR por tuta jaro kaj profiti la retajn servojn de la asocio?
Bela okazo por membriĝi en UEA, ĉu ne? Nu, vi estas bonvena inter la membroj de UEA! Bv. informiĝi ĉe via landa peranto (se tiu ekzistas) pri la transpago de via aliĝkotizo aŭ ĉe *https://uea.org/alighoj/alighilo* aŭ *pri pagmanieroj: https://uea.org/alighoj/pagmanieroj*, aŭ rekte al: *adjevia@gmail.com*.

# Ekzemplo de laboro de la Afrika Komisiono

Kiel instanco de UEA por agado en Afriko, la Afrika Komisiono plenumas sian rolon laŭ disponeblaj rimedoj kaj en la limo de ĝiaj ebloj. Dum iuj apresas la laborojn de la komisiono, aliaj tute ne vidas ĝian utilon. Certe personoj en la rilato kun la personoj laborantaj en la komisiono, kaj ankaŭ kun la funkciuloj de UEA, ja konscias pri la utilaj laboroj farataj de tiuj komisionanoj ne nur por la estraro de UEA, sed por la tutmonda ĝenerala movado.
Unu el tiuj ĉi laboroj estas respondi al gravaj demandoj de afrikanoj pri la lingvo kaj la movado. Ĉi-sekve estas ekzemplo de demando:

AFRIKA KOMISIONO DE UEA

*Mi skribas al vi pri kiel mi povas komenci E-klubon. Mi havas iom da homoj, kiuj estas interesataj pri Esperanto. Ĉu vi havas ajn punktojn pri kiel mi povas sukcese fondi Esperanto-klubon en mia lando?* Ne nur tiu demandinto bezonas klarighelpon, sed multegaj aliaj afrikanoj, precipe en la landoj, kie ankoraŭ ne estas bone organizita asocio aŭ kie ĝi dormas.

La Afrika Komisiono estas je ĉies dispono por helpi ĉefe pri lertigado lingve kaj movade de ĉiuj. Disvastigi la uzadon de Esperanto estas la esenco mem de la esperantismo kaj do rekomendinda al ĉiuj bonaj esperantistoj, ĉar estas bela maniero konstante semi kaj allogi novajn personojn al la movado.

Nepras agadi laŭplane, antaŭvidante la disponeblajn ŝancojn kaj rimedojn de la klubo. Jen kelkaj konsiloj, jam konitaj, sed ankoraŭ ripetindaj, por havi vigle interesan kaj funkciantan Esperanto-klubon. Ili baziĝas sur tri specoj de agadpunktoj, nome konsciigo (informado), kapabligo (instruado) kaj komunumo (utiligado):

**Daŭrigota**

# Kameruno kongresis

Kameruno kongresis en Dualo de la 15-a ĝis la 18-a de decembro 2021. La unua tago de la renkontiĝo sub la instigado de la membro de la Afrika Komisiono de UEA Victor Ntonto, koincidis kun la Zamenhofa festotago, ankaŭ nomata la Tago de Esperanta libro. Tiu ĉi estis solane festita de la kongresanoj.

La kongreso interalie pritraktis la revigligon de Asocio de Esperantistoj en Kameruno (AEK). Dum la kongreso okazis ankaŭ prelego de s-ro Thomas Wang pri la internacia lingvo Esperanto, ĉeestaj lingvaj kursoj por la publiko, ekspozicio kaj kunmanĝo en la privata altlernejo ISECMA, la hejmo de la kongreso.

La kongreso efektiviĝis kun sukceso dank' al la sidonema laboro kaj kotizoj de enlandaj esperantistoj kaj ankaŭ per subteno de la Afrika Centro Esperantista (ACE).

**Victor Ntonto**



**Vi estas aktiva, vi deziras aliĝi en UEA sed mem ne povas pagi plenan kotizon. Fondaĵo Canuto povas helpi vin ricevi membriĝon en UEA. Bv. priskribi viajn agadon en la antaŭa jaro kaj planon por la nuna jaro en mesaĝo, kiun vi sendu rete al: *canuto@co.uea.org*.**

# Afriko nekrologas

Sinjoro Lofemba Martin, konga esperantisto, ,naskiĝinta la 3-an de junio 1956, forpasis la 17-an de decembre 2021.

En la landa asocio Demokrata Kongolanda Esperanto-Asocio (DKEA), li multe aktivis ĉefe en la kampo de universitato kaj edukado, i.a. li kunorganizis la ILEI-seminariojn en la jaroj 2009 kaj en 2013. En la unua seminario partoprenis eĉ ankaŭ la tiama prezidanto de ILEI, s-ro Radojica PETROVIĆ. En la jaro 2014 kaj precize la 5-an de julio, la Konga Nacia Komisiono de Unesko agnoskis la Esperanto-instruajn agadojn de DKEA en la Nacia Pedagogia Universitato (UPN) de Kinŝaso, kaj tiam Martin Lofemba estis la ricevinto de la diplomo de la Nacia Komisiono de Unesko pro instiga kaj pionira rolo.

Martin Lofemba estis estro en la departemento de UPN pri Kulturo, Sporto kaj Distraĵoj. Li esperantistiĝis en la jaro 1985 en la tiama Esperanto-Klubo de Kinŝaso en DR Kongo.



Kondolencojn al lia familio kaj al la kongaj esperantistoj!

Lia animo ripozu pace!



La 05-an de oktobro 2021 forpasis unu el la multjaraj afrikaj aktivuloj Désiré Rabevazaha Voavy en Madagaskaro (1940–2021).

Désiré estis ŝtatoficisto, fondinto de Centro Internacia de Esperanto (CIE) kaj instruisto de Esperanto en lokaj universitato kaj lernejoj.

Li estis entombigita la 8-an de oktobro 2021 en la ĉeesto de familianoj kaj lokaj esperantistoj, el kiuj membro de la Afrika Komisiono de UEA, nome Miora.

Omaĝoj multiĝis al Désiré ne nur de afrikanoj, sed ankaŭ de alikontinentanoj, el kiuj tiu de la eks-Direktoro de la CO, Stefan MacGill. La forpasinto estis seninterrompe individua membro de pli ol 30 jaroj de UEA kaj ĝia faka delegito en Antananarivo pri instruado: Esperanto, franca, angla, komerco kaj turismo. Désiré havis 6 gefilojn, 17 genepojn, 8 pranepojn.

Pacon al lia anomo!


***Esperanto en Afriko*** estas trimonata oficiala periodaĵo de la Afrika Komisiono de UEA pri la Esperanto-movado en Afriko.

**Redaktis:** Adjévi Adjé,
06 B.P. 61807, Lomé, Togolando;
tel.: +228 902 57 549, 995 72 623.

Kion faras via landa asocio aŭ via loka E-klubo en via loĝloko? Bonvolu verki kaj sendi artikolon pri tio. La redakcio akceptas ankaŭ fotojn. Bonvenaj komprenebIe estas ankaŭ sugestoj, konsiloj, komentoj por la plibonigo de la bulteno al: *adjevia@gmail.com*.

**Limdato por la 46-a n-ro:** la 31-a de januaro 2022.



**Membroj de la Afrika Komisiono de UEA (2019-2022):**

D-ro Byelongo Elisée Isheloke, **Sud-Afriko**
D-ro Gilbert Niyukuri, **Burundo**
S-ino Miora Ravelohariso n, **Madagaskaro**
S-ro Joel Muhire Ndaziboneye, **DR Kongo**
S-ro Moses Gbetogo Opa, **Niĝerio**
S-ro Viktor Ntonto, **Kameruno**
S-ro Adjévi Adjé, **Togolando**
S-ro Cedrick Irakoze, **Kenjo**

Pli da informoj rilate al la afrika movado haveblas per: ***www.esperanto-afriko.org.***